

Klaus Groth,  
 Vespera paco

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Silentas mond-bruado,  
 Samkiel dormus ĝi,  
 Nek ploro nek ridado  
 Aŭdeblas tie ĉi.

Samkiel infaneto  
 Ensonĝe foliar'  
 Parolas, lulkanteto  
 Ĝi estas por ŝafar'.

Vilaĝo en mallumo  
 Nun kuŝas kaj nebul',  
 Aŭdeblas nur voĉumo  
 De iu fora ul'.

Bovaro gres-manganta  
 Aŭdeblas tie ĉi,  
 Kaj eĉ lepor' dormanta  
 Jen kuŝas apud mi.

Sen bruo, sen kverelo  
 Nun preĝu ĉiuj ni.  
 Jen paco de l' ĉielo -  
 Nin aŭdu, kara Di'!

...

Klaus Groth,  
 Abendfrieden

De Welt is rein so sachen,  
 As leeg se deep in Drom,  
 Man hört ni weenn noch lachen,  
 Se's lisen as en Bom.

Se snackt man mank de Bläder,  
 As snack en Kind in Slap,  
 Dat sünd de Wegenleder  
 Vör Köh un stille Schap.

Nu liggt dat Dörp in Dunkeln  
 Un Newel hangt dervör,  
 Man hört man eben munkeln,  
 As keem't vun Minschen her.

Man hört dat Veh int Grasen,  
 Un Allens is in Fred,  
 Sogar en schüchtern Hasen  
 Sleep mi vör de Föt.

Das wul de Himmelsfrieden  
 Ahn Larm un Strit un Spott,  
 Dat is en Tid tum Beden -  
 Hör mi, du frame Gott!

...

*Traduko de la Basgermana poemo "Abendfrieden" de KLAUS GROTH (\*1819-04-24 - †1899.06-01) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2012-05.*

*Arg-553-1184 (2012-09-03 11:23:04)*

*Verkinto de tiu ĉi Basgermana poemo estas KLAUS GROTH (\*1819-04-24 - †1899.06-01).*

*Arg-553-1114 (2015-01-27 11:46:24)*

*Pri la verkinto vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Klaus\\_Groth](http://de.wikipedia.org/wiki/Klaus_Groth).*

*Vidu ankaŭ la retejon <http://lowlands-l.net/groth/>.*